# *Dua tago sen novaj lokaj malsanuloj de Covid-19 en ?inio*



Pekino, mar 20 (RHK) ?inio notis sian duan tagon sinsekvan sen novaj lokajmalsanuloj de Covid-19, sed kreskis la kazoj inter alvenintoj de eksterlando ?is la nombro de 228, kio kondukis al interrompo de internaciaj flugoj.

La nacia komisiono pri sano detaligis ke nur forpasis unu persono en Liaoning kaj alia en Hubei, la epicentro de la spirmalsano, kiu komenci?is pasintdecembre.

La kresko de tiuj malsanuloj prezentas novan defion por la plano de prevento kaj kontrolo epidemiologia aplikita de anta? du monatoj en ?inio kun pozitivaj rezultoj.

Fronte al tiu scenejo, Guangdong suspendis la internaciajn flugojn  kun destino al la flughaveno de Chaoshan, la kompanio de Hong Kong Express nuligos ?iujn itinerojn ekde la venonta lundo, kaj China Eastern Airlines same faris  ?is Shanghái.

Pekino komencis devojigi kelkajn itinerojn elirintaj el Rusio, Francio, Japanio kaj Kanado al la najbara urbo de Tianjin, Hohhot (interna Mongolio) kaj Taiyuan (provinco de Shanxi).

La? la a?toritatuloj  de la sektoro, la pasa?eroj devos esti submetitaj je kontrolo sana en ?iu terminalo, kaj tiuj, kiuj ne prezentas simptomojn de Covid-19 povus reiri al la ?ina ?efurbo.

Oni anka? planas devojigi pliajn internaciajn flugojn en la venontaj tagoj ekster Beijing, kiu preparis 149 centrojn por koncentri en kvarenteno tiujn, kiuj alvenas el eksterlando.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/217272-dua-tago-sen-novaj-lokaj-malsanuloj-de-covid-19-en-cinio

**Radio Habana Cuba**